



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA D E T

N-ro 1
1975

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
Redaktoro: Hans Amund Rosbach


3-a periodo
42-a (51-a) jaro
Dumonata

Okaze de la virina jaro :

Nia celo estas edziniĝi, ne feliĉiĝi. Mi vidis ambaŭ miajn fratinojn plenumi sian destinton.

Ili akceptis siajn edzojn post pripenso, libervole, sed ili sub nenijaj kondiĉoj mem elektus ilin. Kiom vivaj tiuj scenoj ankoraŭ estas. Ili faris impreson, kiu estas neforgebla. Ambaŭ miaj bofratoj sinsekve estis instruistoj en nia domo.

Kiam Maria finanĉiniĝis al Broch, la rigida, neeltenebla pedanto, kiun ŝi mem tiel ofte rikanis, mi ankoraŭ estis eta. Kiam ni kolektiĝis kaj oni proklamis tion, mi diris al li: «Kiel vi povas imagi tion; ŝi nur trompas vin!» Marie — kiu mortis juna — estis la urua oferdono; ŝi ja pli aĝis. Laŭdire ŝi estis tre bela, sed pri tio mi ne havas iun impreson. Eble tiu beleco havis tiun seriozan, spiritan karakteron, kiun infano ne komprenas. — Sed Louise estis freŝa kaj brila kiel printempa tago kiam ŝi



hejmenvenis post du-jara restado ĉe onklino en Kopenhago.

— — —

Jes, la sorto de Louise afliktis min pli. Ke ŝi povis tion fari! Kiel mi malamis tiun Caspers. Li estis pli juna kaj pli bela ol Broch, havis tielnomitan «luman kapon» kaj ĉiam diris

spritaĵojn; sed tiuj trajtoj nur servis por reliefigi lian krudecon kaj memestimon. Li ĉiam kondukis malgracie kaj senrespekte al miaj patrino kaj fratinoj, kaj li ne hontis, kiam li instruis al Edvard, ke ĉiuj virinoj estas subulaj estaĵoj, kiuj ne meritas pli bonan konduton. Tiu instruado portis fruktojn. Li, kiu estis afabla knabo, iĝis al ni fratinoj tirano kaj monstro. Tamen s.ro Caspers enamiĝis al Louise kaj humiligis sin svati ŝin. Neni-am mi forgesos tiun tagon.

(Fragmentoj el Camilla Collett:
«La filinoj de la guberniestro»)

Sciigoj de N.E.L.

Norvega Esperantisto. Se vi deziras eviti interrompon en la ricevado, ni varme petas vin tuj pagi vian kotizon. — *Rektaj membroj* bonvolu estis sian kotizon (kr. 30,-, familianoj kr. 10,-, junuloj kr. 10,-) al N.E.L. (poŝtgirokonto 100.30), la *klubanoj* bonvolu tuj pagi al la kluba kasisto. Al la klubaj kasistoj ni varme petas: bonvolu *senprokraste* ekagi por kolekti la kotizojn de la klubanoj, kiuj ankoraŭ ne pagis por 1975, kaj sendi listojn kaj kotizojn por la jam pagintaj klubanoj laŭeble baldaŭ. Antaŭan dankon!

Subtenantaj membroj. Ni petas ĉiujn membrojn, kiuj havas okazon por tio, anonci sin kiel subtenantajn membrojn de N.E.L.; la kotizo estas «minimume kr. 45,00» por unu jaro. Klubanoj fariĝas subtenantaj membroj pagante kr. 20,00 aldone al sia klubkotizo.

Apogmembroj. Ni petas ĉiujn membrojn varbi apogmembrojn (kr. 5,00). Ĉi tiu kategorio celas neesperantistojn, kiuj estas pretaj apogi nian laboron per malgranda sumo; ili ricevas la jarraporton.

60a *Universala Kongreso de Esperanto* okazos en Kopenhago 26. Julio — 2. Aŭgusto 1975. Turisma Servo de N.E.L. (sino Kirsten Ek, Otto Ruges vei 66, 1345 ØSTERAS, poŝtgirokonto 1.00.32) sendas aliĝilojn kaj akceptas aliĝilojn, kotizojn kaj mendojn por la kongreso. Oni ankaŭ planas grupvojaĝon el Oslo.

La kontorfondaĵo. Ni denove memorigas pri tiu grava donac-fondaĵo, kiu certigas la tenadon de nia oficejo. Ĉiu donaco estas tre valora helpo por la ekonomio de N.E.L.

La Propaganda Fondaĵo. En 1974 ni devis pruntepreni preskaŭ la tutan kapitalon de tiu fondaĵo por eldoni la novajn lernolibrojn, kio signifas, ke ni estas preskaŭ sen rimedoj por eldonado de aliaj propagandiloj, por efektiviĝo de prelegvojaĝoj, k.t.p., ĝis la pruntedonita mono iom post iom revenos per la vendado de la lernolibroj. Ni tial permesas al ni memori la membrojn ankaŭ pri tiu tre grava fondaĵo.

Taskotabelo por kluboj. — *Februaro:* La studgvidanto kontrolas la laboron de la studrondoj kaj klopodas fondi novajn. Antaŭ la 15a la sekretario sendas jarraporton pri la pasinta jaro al N.E.L. kaj al la Distrikto (bl. A 11). La kasisto sendas skriban kotizpostulon al ĉiuj nepagintaj klubanoj, kun plenigita poŝtgirokarto aŭ poŝtmandato, informante, ke post unu monato oni eventuale sendos poŝtan enkasigilon. Estrarkunveno planas la martajn kunvenojn.

Marto: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas poŝtan enkasigilon al la membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon.

Raporto de la Liga Estraro pri la 4a jarkvarono. Okazis du estrarkunvenoj, kaj oni sendis unu cirkuleron al la kluboj kaj rektaj membroj (i. a. pri donac-abonoj al Norvega Esperantisto). Oni decidis aperigi norveglingvajn resumojn en Norvega Esperantisto de artikoloj kaj informoj, kiuj havas intereson ankaŭ por neesperantistoj. Oni decidis daŭrigi Kampanjon Reisæter dum plia 3-jara periodo. Oni laboris por varbi eksterlandajn partoprenontojn al la Norvega Esperanto-Kongreso en Tromsø kaj komencis prepari la tagordon de la laborkunsidoj tie.

La Liga Estraro.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Provizora redaktoro :

Hans Amund Rosbach
Johan Hammond Rosbach

Adreso de la redakcio :

Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N
(Limdato por manuskriptoj : la 20.
en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo : En Norvegujo kaj eksterlando : n. kr. 12,—.

Anoncprezoj : 1/1 p. kr. 150, 1/2 p. kr. 75,
1/4 p. kr. 40, 1/8 p. kr. 20.

Kampanjo Reisæter

Dum la lastaj tri jaroj vi jam ofte legis en nia revuo pri la Kampanjo Reisæter, sed verŝajne nur tre malmultaj membroj scias, en kia grado tiu kampanjo efike helpis al la laboro de la estraro kaj entute al la laboro por Esperanto en nia lando.

La origina ideo de la iniciatintoj, Trygve Reisæter kaj Elna Matland, estis en tri jaroj kolekti kr. 30 000 kiel bazon por dungo de vojaĝanta sekretario. La celo estus atingebla, se 100 membroj deklarus sin pretaj ĉiujare dum tri jaroj doni po kr. 100. Kiam tiu celo montriĝis tamen tro ambicia, la iniciatintoj proponis, ke la mono ricevota iru en la ĝeneralan kason de N.E.L. por redukti la ekonomiajn zorgojn kaj doni al la estraro iom pli liberajn manojn por ion efikan entrepreni por Esperanto.

En la nuna tempo, kun la freneza altiĝado de ĉiuj prezoj, inkluzive de la afranko, tiu helpo estis kvazaŭ

«savanta anĝelo». Sen ĝi ne estus eble eldoni niajn broŝurojn, daŭrigi la gazetaran servon k.t.p., ĉar la nura administrado, inkluzive de la eldonado de Norvega Esperantisto, formangas la tutan kotiz-enspezon, kvankam ĉiu laboro por N.E.L. estas farata sen ia ekonomia rekompenco. Por entute starigi buĝeton sen deficino estis necese kalkuli kun la enspezo de Kampanjo Reisæter.

Kiom donis al ni la Kampanjo? Jes, en 1972 kr. 1800, en 1973 kr. 2900, en 1974 kr. 3000. — La Estraro korege dankas al ĉiuj fidelaj kontribuintoj.

La Kampanjo estis lanĉita por tri jaroj, kaj por la plimulto de la kontribuintoj 1974 estis la tria jaro. La demando estas nun, kiel plu daŭrigi la laboron sen drasta plialtigo de ĉiuj kotizoj? Iuj opiniis, ke oni ne povos daŭrigi la Kampanjon post la paso de la komence anoncintaj tri jaroj. Sed la patro de la tuta ideo, Trygve Reisæter, kun sia kutima entuziasmo diras: Kompreneble, ni simple komencu plian trijaran periodon! Kaj post tre serioza pristudo de la situacio la Estraro decidis denove akcepti lian ideon, kiu jam montriĝis tiom valora.

Sekve ni nun apelacias al vi, kiu jam partoprenis en la Kampanjo Reisæter dum la jaroj pasintaj, kaj al vi, kiu ankoraŭ ne havis okazon kontribui al ĝi, bonvolu konsideri ĉu vi havas eblecon partopreni dum la nova trijara periodo. Se jes, vi povos sendi po 100 kronojn jare al N.E.L., poŝtgirokonto 1.00.30. Certe, la nepoj vin benos. Koran dankon!

C. Støp-Bowitz

prezidanto

Kampanjo Reisæter 1974

Pli frue	kr. 2700,00
O. Thormodsen	» 100,00
Karen Berge	» 100,00
Aase, Randolf & Kjell ...	» 100,00
	<hr/>
	kr. 3000,00

La Propaganda Fondaĵo 1974

Pli frue	kr. 100,00
S. Korstvedt	» 30,00
Torstein Andersen	» 100,00
	<hr/>
	kr. 230,00

La kontorfondaĵo

Pli frue	kr. 1366,20
Ges.roj M.	» 25,00
Aa. & Kj. Gustavsen	» 50,00
C.S.B.	» 20,00
W. Gjertsen	» 60,00
L. Belle	» 70,00
I. Skaugen	» 20,00

kr. 1611,20

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

Subtenantaj Membroj 1975.

E. Gjessing, P. Hillestad, O. Hjertaas

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ordinaraj printempaj ekzamenoj. - Ekzameno okazos ĉirkaŭ la 1-a de Junio 1975. Instruistanoj ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Trondhejmo; personoj loĝantaj en lokoj, kie ne troviĝas loka ekzamena komitato, povos plenumi elementan aŭ superan ekzamenon en Tromsø okaze de la 44a Norvega Esperanto-Kongreso 5.—7. Julio. Oni anoncu sin per la skemoj riceveblaj de la ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1a de Majo*; por ekzameno en Tromsø oni anoncu sin rekte al la Ekzamena Komisiono en Oslo *antaŭ la 1a de Junio*. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenumu po 2 —

du — skemojn. *Plenumu la skemojn akurate kaj komplete!* — *Aliĝoj, kiuj alvenos post la supraj limdatoj, ne estos konsiderataj.*

Adresoj de la lokaj ekz. komitatoj:

OSLO: Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo I. Poŝtĝirokonto 1.00.34.
BERGEN: S.ro Kjell Offerdal, Sv. Hjetlands vei 6B, 5031 Laksevåg.
HAUGESUND: S.ro Olav Thormodsen, Boks 59, 5501 Haugesund.
SARPSBORG: S.ro Johan H. Rosbach Huldervn. 17 B, 1700 Sarpsborg.
SAUDA: S.ino Elna Matland, Brekkevn. 50, 4200 Sauda.
TR.HEJMO: S.ro Erling A. Haugen, Sig. Bergs Allé 12, 7000 Trondhejmo

EKZAMENA KOMISIONO DE N.E.L.

C. Støp-Bowitz
prezidanto**60-a Universala Kongreso de Esperanto**

Kopenhago 26a de julio - 2a de aŭgusto

Eksperimenta kongreso? La oficiala komuniko 3/74 antaŭdiras, ke «tre verŝajne jam en Kopenhago resp. gvidiĝos la nova gvidlinio: «eksperimenti kaj diversigi».

La Belartaj konkursoj plivastiĝos per nova branĉo Fotografio. La sekretario de la Belartaj Kongresoj, s.ro Alec Venture, 55 Park Hill, Carshalton, Surrey SM5 3 SE, Britujo, donas informojn kaj akceptas konkursaĵojn. Limdato: la 31a de marto. Ni ne forgesu, ke tio estas la arĝenta jubileo de tiuj konkursoj.

«Aldonaj kongresoj» estas la TEJO-kongreso en Fredericia (19.—26. de julio, Blindula kongreso en Hillerød (20.—26. de julio) kaj Infana Kongreseto en Hellerup.

Pri La internaciaj feriaj kursoj de Helsingør

Post 43-jara aranĝado kaj gvidado de la internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingør, ni sentis, ke nun venis la tempo por retiri nin de tiu laboro. Tial ni transdonis la aranĝon al komitato de kelkaj anoj de la Esp-klubo de Helsingør kaj de la najbara klubo de Helsingborg. — La prezidanto de la komitato estas s-ro Gösta Persson, Helsingborg, la kasisto s-ino Inga Magnusson, Helsingborg, kaj la ĝenerala sekretario s-ino Eva Langkilde, Helsingør.

Ni sincere ĝojas, ke tiel fervoraj

kaj lertaj samideamoj kiel ili transprenos la laboron.

Ĉiujn korespondaĵojn kaj petojn pri kursprogramo bonvolu sendi al

Sino Eva Langkilde,
Ingemannsvej 18,
DK-3000 Helsingør, Danmark.

Ni ĉeestos ankoraŭ en la venonta somero en la libroservo de la kurssemajno.

C. & L. Friis

Libroklubo

Internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5/1 p.p. 703, 41000 Zagreb, Jugoslavio, iniciatis libroklubon, kaj en la kadro de la klubo nun lanĉas libroserion sub la nomo FURORO-serio. En ĝi unue prezentiĝas 4 nobelpremiitoj: Heinrich Böll per «Novelaro», Aleksander Solŝenicin per «Rakontoj», Patrick White per «Novelaro» kaj Miguel Angel Asturias per «La Prezidanto». La membroj de la libroklubo rajtas 25%an rabaton kaj krome 10%an rabaton je ĉiuj aliaj eldonaĵoj de Internacia Kultura Servo. Membreco de la libroklubo kosta 4 GM. La varbfolio kun mendilo estas havebla ĉe la supra adreso. (Bedaŭrinde ĉiuj prezoj estas en «GM aŭ egalvaloro», kio al mi estas nur enigmo. Rim. de red.)


Korespondu!

40 geknaboj kaj fraŭlinoj, tre lertaj lernantoj, deziras korespondi kaj interŝanĝi kun tuta mondo. Bonvolu skribi al instruisto: Rodolfo Canet, Strato Quintana, 12—3° ALICANTE, Hispanujo.

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek



15a EUROPA FERIOSEMajNO — E.F.S. — 1974 EN SVISIO

okazis 22.-28. septembro en Magliaso, situanta 25 km de la lago Lugano. La 87 partoprenantoj, el ili 2 norvegoj (mi kaj mia edzino), 2 svedoj kaj 2 danoj, alvenis tagmeze la 22an al la urbo Lugano, de kie ni aŭtobusis al la feria centro Magliaso, kiu konsistas el pluraj domoj kaj dometoj, kaj tie ankaŭ estas eksterdoma naĝbaseno. La programo estis tre varia kaj interesa. Estis 3 manĝoj ĉiutage, bonega manĝaĵo, kaj ĉiutage estis antaŭtag-

meze lecionoj en Esperanto de la 8.15a ĝis la 11a, kaj posttagmeze okazis interesaj ekskursoj al diversaj belaj lokoj. Dum la vesperoj okazis i. a. filmvespero, dum kiu prezentiĝis la filmo de N.S.B. «Mi estis tie», kiu kaŭzis grandan efikon. La feriosemajno estis bonege organizita, kaj la programo bonege gvidata de Hans Hunkeler kaj Ernst Glättli, kiu cetere estas fervojistoj.

Erling Rygge.

LA PLEJ MALLONGA SUBTERA TRAMLINIO DE LA MONDO

(EI «JERNBANEMANDEN»)

Ne nur en la plej multaj urbegoj, sed ankaŭ en kelkaj malgrandaj urbegoj, estas konstruitaj subteraj tramlinioj. Ankaŭ Laŭsanne en Svisio, kie loĝas 136 000 homoj, havas sian subteran tramlinion, kiu verŝajne estas la plej mallonga de la mondo. Laŭsanne situas en deklivo. Nur kelkaj stratoj estas horizontalaj. Oni devas iri aŭ supren aŭ malsupren, kaj tio estas unu el la kaŭzoj ke la respondecaj aŭtoritatoj decidis konstrui ĉi tiu linio. De la centro de la urbo, kie estas belega elvidaĵo al la bela, blua lago Genfersjøen, oni per la

subtera tramlinio vojaĝas malsupren al la haveno, al la urbparto Ouchy, apud la lago. Laŭ la linio, kiu estas nur iom pli ol 1 km longa, situas 5 stacioj, kaj la vojaĝo, kiu daŭras 9 minutojn, kostas 0,60 svisaj frankojn (1,10 norv. kr.). La trajnoj estas modernaj kaj tiel larĝaj, ke oni povas imagi, ke oni estas en taga ĉambro. Estas sufiĉe da sidlokoj kaj sufiĉe da loko por stari, se necesas. La distanco inter la malnova urbparto kaj la ĉefstacio, 2-minuta vojaĝo, estas plej aplikata, sed laŭ ĉi tiu distanco la vagonoj ordinare estas nur duonplen-

16-a Eŭropa Feriosemajno en Svislando (EFS)

Ĝi okazos de la 31-a de aŭg. ĝis la 6-a de sept. 1975 sur FÜRIGEN apud Stansstad ĉe Vierwaldstätter-lago kaj estas organizita de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF). — La semajnpromado konsistas el antaŭtagmezaj Esperanto-lecionoj trigradaj, gvidataj ekskursoj variaj kaj vesperaj aranĝoj distraj. — Anoncojn kaj informpetojn oni adresu al S-ro *Ernst Glättli*, SAEF-sekretario, Laurstr. 17, CH-5200, Brugg (Svisl.)

ERARO

Ni lastfoje menciis la decidon de KKK (la klubo en Kopenhago) eliri el UEA, pri kiu ni ricevis cirkuleron. La klubo nun informas, ke tio temas nur pri du-tri personoj.

POŝTMARKAJ DONACOJ

Ni kore dankas al s-ino T. Östman, Enskede, Svedujo, kaj al s-ino Elna Matland, Sauda, kiuj sendis donace poŝtmarkojn favore al Norvega Esperantisto. — Ni kaptas la okazon por memori pri tiu ebleco plibonigi nian ekonomion. Bonvolu ĉiam sendi la poŝtmarkojn al N.E., Hulderveien 17, 1700 Sarpsborg.

aj dum la veturado malsupren, ĉar estas ja pli bone iri malsupren ol supren laŭ la mallarĝaj stratoj. Kvankam ĉi tiu subtera tramlinio estas tiel mallonga, ĝi tamen laŭ ekonomia vidpunkto estas tre grava, ĉar oni vere bezonas ĝin en ĉi tiu urbo situarta en la montardeklivo.

Someraj

Universitataj Kursoj

Alispeca kunveno. De la 4a ĝis la 25a de aŭgusto 1974 okazis la dua sesio de la Someraj Universitataj Kursoj en Liege, Belgujo. Temis pri studoj de biologio, kemio kaj sociolingvistiko, kaj oni prezentis sume 18 kursojn de po minimume 8 lecionojn. Gvidis ilin 9 universitataj instruistoj el Argentino, Francujo, Grandbritujo, Japanujo, Kanado, Norvegujo kaj Usono.

La lingva situacio en Norvegujo. Oni uzis la tempon ankaŭ por aliaj celoj, i. a. faris studvizitojn al zooloĝia muzeo kaj al la mikslingvaj regionoj norde kaj oriente de la provinca ĉefurbo. Unu vespero estis dediĉita al la lingva situacio de Norvegujo.

Eldonoj. Ja estas eldonitaj 11 kursoj teksto de po — meznombro — 70 paĝoj. Pliaj tekstoj estas preparataj aŭ jam presataj.

Tria sesio okazos 1976 kun la fakoj matematiko, biologio kaj sociologio.



RADIO ROMA informas :

Sub redakto de D-ro Antonio De Salvo, via Clelia 88, I-00182 Roma, la kunlaborantoj f-ino Mirella Merlani kaj d-ino Vera di Tocco ĉiudimanĉe elsendas 20 minutan programon ek de la 21-a, sur ondlongoj 41,15, 41,24 kaj 49,92 (khz: 7.290, 7.275 kaj 6.010). Aŭskultu — kaj sendu al la stacio poŝtkarton.

★ Recenzoj ★

L. Mimo: Kompletla lernolibro de regula Esperanto. — Eldonis la aŭtoro, Sabadell, Hispanujo, 1973.

Mi uzas la mallongigojn: PG = Plena Gramatiko de Kalocsay kaj Waringhien (dua eldono, 1938, kiam temas pri vortfarado). PIV = Plena Ilustrita Vortaro. LM estas uzata parte pri L. Mimo kaj parte pri la libro recenzata.

Anstataŭ doni tro suprajn priparolon de la tuta libro, mi priparolas nur la trian parton de la libro kiu priraktas la vortfaradon. Mi volas tamen noti ke mi pli multe konsentas pri la enhavo de la du unuaj partoj de la libro ol pri tiu de la tria parto.

LM ofte citas PG, kelkfoje kun aprobo, kelkfoje kun malaprobo. Estas nature en mia recenzo kompari LM kun PG. En la komparo kun PG ni povas konsideri tri grupojn de kunmetitaj vortoj.

I. Kunmetoj por kiuj LM kaj PG havas la samajn regulojn.

Laŭ regulo 11 de la Fundamenta Gramatiko la ĉefa vorto staras en la fino de la vorto kunmetita.

LM diras: «La flank(a) vorto(j), nur substantivo(j), laŭsence enkondukita(j) per prepozicio.» Kiam la ĉefa vorto estas substantivo aŭ adjektivo tiu regulo akordas kun PG. Ekzemploj: Fenestrovokovrilo = kovrilo de fenestro. Florpoto = poto por floroj. Vivoplana = plena de vivo. Prespreta = preta por preso.

LM konsentas kun PG ke ni devas ne uzi kunmeton kiu estas analizebla

nur per adjektivigo de la flankelemento. Estas erare diri belknabino anstataŭ bela knabino.

II. Samaj kunmetoj laŭ malsamaj reguloj.

LM havas sekcion pri kunderivitaj adjektivoj formitaj el adjektivaj prepozitivaj. Ekzemploj: Dubakaraktara = kun duba karaktero. Lastatempe = en la lasta tempo. PG havas tiajn kunmetojn laŭ alia regulo. La adjektiva (adverba) finaĵo estas rigardata kiel ĉefelemento kaj la aliaj elementoj kiel «disfalaj flankelementoj». La disfalaj flankelementoj troviĝas en PG ankaŭ kun ĉefelementoj kiuj estas sufiksoj: -ano, -aro, -eco, -igi, -iĝi. Laŭ la ekzemploj de LM ŝajnas ke li akceptas tiajn kunmetojn. Li tamen ne donas ĝeneralajn regulojn por ili, kaj ne parolas pri kunderivitaj vortoj en tiu kunteksto.

LM havas sekcion pri prepozicioj uzataj kiel prefiksoj ĉe la verboj. Ekz.: Kunludi = ludi kune. Kunmeti = meti kunaj. Tiaj vortoj en PG estas kunmetoj laŭ la ĉefa regulo kiam la ĉefelemento estas verbo.

LM klarigas vorton kiel triangulo kiel mallongigon de triangulaĵo. PG klarigas triangulo per «inversa vortefiko».

III. Malsamaj esprimoj laŭ malsamaj reguloj.

En sekcio kun la titolo: «Ĉu ne sofismoj?», LM diras pri la pravigo en PG de la vortoj fruktodoni, leter-skribi, voĉdoni: «...intence pravigi ties konstruon per strangaj kombinoj, tio estas troa.» En la sama sekcio LM malakceptas la regulon de PG pri

inversa vortefiko. Tiu regulo estas uzata en PG por pravigi interalie vortojn kiel senforta, senutila. Laŭ LM oni devas diri senforteca aŭ senforta La lasta vorto cetere estas la preferinda vorto laŭ PIV.

LM ne akceptas kunmeton kun adverba flankelemento se ĝi ne povas esti esprimata per prepozitivo, kaj en la lasta kazo li volas doni al la flankelemento la finaĵon -o anstataŭ -e. En la mala kazo li volas skribi la adverbos aparte.

PG kaj eĉ pli PIV havas prepoziciojn kaj aliajn radikojn kiel prefiksojn. LM akceptas multajn tiajn prefiksojn kaj malakceptas multajn aliajn, ekzemple ĉef-, duon-, grand-, nov-, supren-, tro-. Mi ne tute komprenas laŭ kiuj reguloj LM akceptas kelkajn tiajn prefiksojn kaj malakceptas aliajn.

LM argumentas por pli da logiko en la lingvo. Almenaŭ en unu kazo li ne vidas la ĉefan mallogikajon. Li proponas intersekvo anstataŭ sinsekvo. Ambaŭ vortoj estas mallogikaj. Sinsekvo estas aro de personoj aŭ objektoj, kaj tiu aro nek sekvas sin mem, nek intersekvas.

En la plej multaj kazoj la kritiko de LM trafas unu el du aŭ pluraj samsignifaj esprimoj kiuj jam estas en la lingvo. Li malakceptas centjaro favore al jarcento. Anstataŭ voĉdoni li volas diri voĉi aŭ doni voĉon. En kelkaj kazoj li proponas novan vorton ekzemple partumi anstataŭ partopreni, simortigo anstataŭ sinmortigo.

Persone mi plej ofte preferas la regulojn de PG pri vortfarado. Sed la repensado pri gramatikaj reguloj al kiu stimulas LM ŝajnas al mi bona.

Tial mi povas rekomendi la studon ankaŭ de la tria parto de la libro.

Olav Reiersøl

La ĉinoj scipovas.

Ĉinaj Akrobataĵoj. Eld.: Fremd-lingva Eldonejo, Pekino, 1974.

Denove la fremdlingva eldonejo de Ĉinujo mirigas nin per libro, kiun ĉiu ĝojus posedi, preni, folumi, ĝui. Ne pro la tekstoj. Ili estas mallongaj — en germana, hispana kaj Esperanto. Sed pro la bildoj — kaj pro la arto, kiun la bildoj montras.

Unue la libro en antaŭparolo donas mallongan superrigardon pri la akrobata arto de Ĉinujo, nur sur 2 paĝoj. Poste sekvas pli ol 100 bildpaĝoj, preskaŭ la duono en plurkolora preso, kiuj prezentas ĉiujn flankojn de la majstra arto, tiel ke oni restas rigardante unu bildon, kaj preskaŭ ne povas kredi ĝin, ĝis oni rigardas la sekvantan, kiu montras eble eĉ pli majstran ekvilibron, jongladon, gimnastikon.

La prezo de la libro bedaŭrinde ne estas indikata, sed nia Eldonejo certe havigas ĝin al vi, se vi mendos ĝin, kaj tion vi certe devas fari.

Hans Amund Rosbach

LITERATURA SUPLEMENTO

«Heroldo de Esperanto» eldonis Literaturan suplementon kun tradukoj el araba, hebrea, hispana, itala, nederlanda, rusa k. ukraina literaturoj, krom originalaj prozaĵoj kaj poemoj. I. a. estas fragmento el la romano de Guareschi «Don Kamilo».

Ĉu vi tradukas?

Vi fortsetter fra nr. 6/1974

6. *Taket på min onkels hus er dekket med dyrehuder.*

Først minner vi om at tak inne i hus heter *plafono*, og taket ute heter *tegmento*. Dersom det dreier seg om et slags eiendomsforhold, f.eks. altså husets tak, er preposisjonen *de* å foretrekke: *la tegmento de*.... At vanlig genitiv med *s*-endelse ikke finnes på esperanto, er elementært og kjent for alle. Vanskeligheten i denne setningen ligger i preposisjonen 'med'. Sammenlign disse to setninger: a. *La florbedo estas kovrita de neĝo.* b. *La florbedo estas kovrita per neĝo.* Per angir redskap, middel — altså har en eller annen dekket blomsterbedet med sne i setning b. I setning a. er det sneen som har dekket bedet. Dette gjør forholdet straks klart, og vår setning er ferdig:

La tegmento de la domo de mia onklo estas kovrita per bestaj haŭtoj.

7. *Banditten har iført seg et stripebadehåndkle.*

«Iføre seg» må vi oversette med

LIBROKATALOGO

Dansk Esperanto-Förlag eldonis librokatalogon, senpage haveblan ĉe la eldonejo: Ingemannsvej 9, DK-8230 Åbyhøj.

La jarlibro de UEA ĵus aperis, kaj en ĝi estas plena librokatalogo pri libroj haveblaj ĉe UEA, kaj tial ankaŭ mendeblaj ĉe Esperantoforlaget.

vesti sin per. Når det gjelder «stripete», vil spørsmålet melde seg hvorvidt det er noen som *har stripet*, dvs. laget striper — da må det hete *striita*, et ord som også er anvendelig f.eks. om landskap: *la monto estas striita de sulkoj.* Ellers er vel *stria* mere anvendelig, f.eks. nettopp om ting som håndklær. Et håndkle heter naturlig nok *mantuko*, men *banmantuko* er ikke så vellykket, både fordi det ikke klinger godt, og fordi det ikke dekker faktum. Vi foreslår ganske enkelt *bantuko* eller *tualeta tuko*.

La bandito vestis sin per stria bantuko.

8. *Kvinnene vanner blomstene for at de skal vokse fortere.*

Zamenhof har selv brukt ordet *akvi*, men *akvumi* foretrekkes. «For at» heter *por ke* og krever *u*-form i verbet. «Vokse» ble gjennomgått i forrige nummer. Vær klar over at «fortere» i denne setningen står til verbet og derfor skal ha endelsen *-e*.

La virinoj akvumas la florojn, por ke ili kresku pli rapide.

9. *Gamlingene bærer sine fiskeredsaker til vannet.*

Her er det ikke egentlig noe spesielt å passe på, for alle vet jo at *stoffet* vann heter *akvo*, og at et vann, en sjø, heter *lago*.

La maljunuloj portas siajn fiŝkaptilojn al la lago.

10. *Ungdommen har dannet et lite orkester av fløytespillere.*

«Ungdommen» er alter et ord som er tvetydig på norsk; det kan betegne en enkelt person eller en gruppe per-

soner. Vi forstår straks at det her gjelder en gruppe: *junularo*. For at det ikke skal få et generelt preg, vil vi her likevel foretrekke å sette enkeltpersonen i flertall: *junuloj*. — «Danne» betyr flere ting, her betyr det nærmest grunnlegge, altså *fondi*. «Danne» er for øvrig et verb vi må se nøyer på en annen gang. Når man lager noe av noe, er *el* den rette preposisjon. Flutludisto kan også hete bare *flutisto*.

La junuloj fondis malgrandan orkestron (orkestret) el flutistoj.

Ak. III.



HELSINGØR 1975

tuj antaŭ UK de Kopenhago

La internaciaj feriaj Esperanto-Kursoj okazos 20.—26. de julio en La internacia Altlernejo de Helsingør. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Kopenhago.

Programo senpage havebla ĉe

EVA LANGKILDE

Ingemannsvej 18

DK-3000 Helsingør, Danlando

La rektaj membroj

Da følgende i svært liten grad angår våre utenlandske lesere, vil det bli skrevet på norsk.

Norgea Esperantisto har gjennom de siste år arrangert en rekke konkurranser og andre tiltak med henblikk på en styrkning av en meget presset økonomi. I høst gikk henvendelsen til alle norske rektaj memboj samt livsvarige medlemmer av NEL. 115 sendinger gikk ut. Det vil si 65 kroner til porto. Dertil stensil pluss papir, i alt vel 70 kroner. Men hva var vel det, når man teoretisk — dvs. hvis alle reagerte positivt og sendte minstebeløpet, kr. 5,00 — kunne få inn 575 kroner på aksjonen?

Hvordan ble så resultatet? I alt syv svarte. Av de syv betalte fem. Et par sendte også med noen frimerker. Vi takker hjertelig de syv og spesielt de fem. Det gleder oss å kunne si at utgiftene ble mere enn dekket ved det de fem sendte. En sendte hele femti kroner!

Imidlertid viser dette det fenomen som alltid har vært svakheten: det er de meget få som utretter noe. Og denne gangen hadde det kostet så lite. En annen gang får en annen ta initiativet til et opplegg, det utgår ikke flere herfra.

Det var et par konkurranser knyttet til opplegget. Er det konkurranse, skal det også være premie. Det er det ikke overskudd til, så initiativtageren dekker dette. Premie er sendt til s.ino Gerd Strand, Hjelmsgate 7B, Oslo 3.

JHR.

Til lærerstudenter/lærere av alle kategorier

Lærerseksjonen innenfor Norsk Esperanto-Forbund består av de av forbundets medlemmer som utdanner seg til lærere, eller virker som lærere i alle skoleslag, fra førskole til universitet. Da vi ikke er sikre på om vi har fått registrert alle, ber vi om at de som ikke har mottatt sirkulærer fra lærerseksjonen i 1973—74, melder fra, slik at vi kan få dere på medlemslisten vår. Dette medlemskapet koster ikke noe ekstra utenom det ordinære medlemskapet i NEL, men det styrker oss som organisasjon at vi har flest mulig medlemmer.

Vennligst meld fra til formannen i seksjonen, Elna Matland, Brekkev. 50, 4200 Sauda.

Korespondu!

Argentina teknikisto, vizitonta ĉi-somere Eŭropon kaj Norvegujon, deziras korespondi kun norvegoj kaj ev. viziti ilin. Roberto Antonio Alonso, Balcarce 163 Bis — ROSARIO, Pcia. Santa Fe, Argentino.

TURISMO = Italo mezaĝa vigla sperta esperantisto petas somere gastigadon ĉe skandinavia familio en farmejo, vilaĝo, monta, mara urbeto; kontraŭ pago aŭ ŝanĝe de gastigado en bela regiono norditala. Julie partoprenos kongreson Tromsø. Aŭguste intencas revojaĝi Bulgarion Nigra Maro, specialaj tarifoj, kunvojaĝontoj ŝatataj. Skribu *Angelo Lovati* — Via Lipari, 8 — MILANO (Italio).

Norvega Kronika

LA ESPERANTOKLUBO DE BERGEN 40-JARA

*Saluton vi, fieraj urb' montriĉa
Vi KYRRE-urbo plena da memor'
Vi flor' de Norveglando legendiĝa
Dediĉas mi versaĵon de favor'.*

Per ĉi tiuj strofoj el «Perspektivo de Fløyen» ni volas memori ke la 29an de oktobro estis 40 jaroj de la fondiĝo de la Esperantoklubo de Bergen. Dum 1934—35 la klubo ne aliĝis al NEL, sed la sola kontakto kun la internacia movado estis la tiama delegito (s.ro Offerdal). La unua prezidanto estis H. Z. Berge kaj lin postsekvis la delegito. Oni fondis teatran grupon kaj viva gazeto «La Lumturo» regule aperis. Membronombro kreskis ĝis pli ol 100, kaj oni invitis eksterlandajn instruistojn de pluraj landoj. Cetere oni starigis kurson por soldatoj kiuj vizitis la klubon.

Gravan rolon kiel prezidantoj, instruistoj kaj iniciantoj de novaj ideoj ludis gesinjoroj Matland. Multjara delegito John A. Nilsen prizorgis novaĵojn kaj radioreportojn de la tuta mondo.

Dum la dua mondmilito la klubo devis «kaŝe» labori, sed post la milito la klubo revigliĝis, kaj ni sukcesis kunlaborante kun Studenta Instru-Sekcio aranĝi publikajn kursojn (3 niveloj).

En 1951 du membroj akiris rajtigilon kiel turistgvidantoj, kaj la klubonomo aperis en la gvidlibro de TTK. La klubo ankaŭ aliĝis al la Okc. Sek-

cio de UNO. Delegito fariĝis Johs. Jähren kiu ankaŭ verkis kaj komponis kluban kanton.

Kiel «pordo al Okc. Norvegujo» Bergen ofte estis vizitata de eksterlandaj samideanoj, kaj multaj dankleteroj atestas ke ili ĝuis la restadon en nia urbo. La klubo 2-foje aranĝis landan kunvenon kaj membroj preskaŭ ĉiu-jare partoprenis UEA-kongresojn, landkunvenojn kaj aranĝojn de la Okc. Distrikto de NEL.

Du el la fondintoj daŭre aktive klublaboras, kaj 1 el la fondintoj (kiu loĝas en Anglujo) vizitas la klubon dum ferioj.

La membronombro malkreskis, sed ankoraŭ troviĝas fidela kerno kiu laboras. Ni prokrastis la celebren de la jubileo ĝis la 12an de Decembro.

Off.

KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO

6/11—74. La vicprezidanto bonvenigis. La programo estis tre grava kaj interesa, nome: «Kiel informi la eksteran mondon pri Esperanto». John Berggreen rakontis pri sia restado en Finnlando. Li montris gazetojn de tie en kiuj aperis artikoloj pri Esperanto, li donis bonajn konsilojn kiamaniere propagandi kaj fine li salutis de Finnaj Esperantokluboj. Th. M. Carlsen priparolis la gazetaran flankon de la informado, kiu ja estas tre grava. Estas necese aperigi artikolojn pri Esperanto en la gazetoj. Th. Smådahl proponis ke oni provu enpenetri en la infanprogramon «Lefsa» en la Televideo. C. Støp-Bowitz kaj L. Anjer priparolis la principaron de Frostavallen kaj boŝurojn kun konsiloj pri informado al la publiko. Oni diskutis

ĉu *Norvega Esperantisto* aperu parte norveglingve por tiamaniere propagandi. Th. M. Carlsen kaj unu el la 3 fervojistaj esperantistoj kiuj estis gastoj, Per Johan Krogstie, priparolis bonajn ekzemplojn pri praktika aplikado de Esperanto kiujn ili antaŭe provis. Vendiĝis libroj por 269,70 kr.

18/11—74. La programo estis aktuala kaj interesa ĉar ĝi temis pri la vojaĝo al la Norvega Esperanto-Kongreso venontjare. Post bonvenigo de la prez. oni ĝuis rigardon de multaj belaj lumbildoj prezentitaj de Kirsten Ek kaj Harda Danielsen. Pri diversaj vojaĝmanieroj, i. a. per la norda-norvega aŭtobuso, kaj pri ekskurso post la landa kunveno, klarigis Kari Kalsås. S. Murak priparolis simpozion en Pollando en kiu li dum la somero partoprenis kaj menciis ke inter junaj pastroj estas intereso por Esperanto. Okaze de la antaŭa Semajno de internacia amikeco la klubo sendis saluletaron al Svisa radio, kaj L. Anjer referis dankleteron de ĝi.

Vendiĝis libroj por kr 160,00.

4/12—74. Al ĉi tiu Kristnask-kunveno, en kiu multaj anoj partoprenis, unue la prez. bonvenigis, kaj starante ni kantis La Himnon akompanataj de Ester Wollbæk kaj C. Støp-Bowitz. Post referado de cirkulero de N.E.L. pri gravaj aferoj C. Støp-Bowitz admonis pri aĉetado de libroj. La librotablo enhavas ja dum ĉiuj klubkunvenoj varian stokon da libroj, kaj estis, pro «La tago de la libroj», ĉi-foje pli varia ol kutime.

Pepita de Caspary legis el verkoj de Julio Baghy kaj Raymond Schwartz kaj faris interesan paroleton pri

kristnask-kutimoj en Hispanujo montrante belan modelon i. a. de hispana staltrogo, kaj ŝi referis paroleton, faritan de klubano, pri kristnask-kutimoj en Nov-Zelando.

En gazeto en Sarpsborg, «Sarpn», aperis artikolo pri la romano «Verda robo» kaj pri ĝia verkinto, Johan Hammond Rosbach, kiun legis Thor M. Carlsen. La amuza skeĉo «Tulla», reĝisorita de Brynhild Østmo, prezentiĝis de Kari Kalsås, John Berggreen kaj Thor M. Carlsen.

Vendiĝis libroj por kr. 218,50.

SAUDA ESPERANTOKLUBO

kunvenis ĉe s-ino Overskeid lunde la 11/11—74. La prez. Norman Birkeli bonvenigis proponante kanton. Poste li legis cirkuleron pri la venonta landa kunveno en Bodø. Oni samopiniis ke tiu kunveno, kun la diversaj aranĝoj, estas tre interesa kaj alloga. Leĉero, alveninta al la klubo, pri internacia esperanta libroklubo, kaŭzis diskuton kiu donis la rezulton ke ni decidis aligi la klubon al la libroklubo. Per tio ni ligis la klubon aĉeti minimume 4 librojn dum jaro. Ni ankaŭ decidis admoni aliajn esperantoklubojn fari same.

Elna Matland sciigis pri la radioelsendoj en Esperanto de Pollando. Ŝi pretigis salutleteron al la radiostacio Varsovio kiun ni ĉiuj subskribis.

Norman Birkeli rakontis pri feria restado en Hispanujo kun ekskurso al Maroko en Afriko. Li ankaŭ montris poŝtkartojn kaj aliajn bildojn de la diversaj lokoj kiujn li kaj lia edzino vizitis.

Post bonega manĝaĵo per kiu nin regalis la mastrino por la vespero,

s-ino Overskeid, s-ro Arthur Bjerke gvidis la lingvan duonhoron. Tre, eble tro, malfacilaj taskoj streĉigis niajn lingvajn kapablojn. — S-ino Karen Berge, 86 jarulino!, legis tre senteme poemon tradukitan de Johan Matland. Spite al pluvego kaj fulmotondro ĉeestis 14 geanoj.

*

ADMONO AL LA ESPERANTAJ KLUBOJ

Sauda Esperantoklubb admonas ĉiuj esperantokluboj kaj unuopaj membroj sin aligi al la *internacia libroklubo esperanta*.

*

Sauda Esperantoklubb

kunvenis lunde la 9an de decembro 74 ĉe ges-roj Olav Andersen. — La kunveno estis kiel kutime dediĉita al la esperanta literaturo kaj al la memoro pri Zamenhof. Prezidanto Norman Birkeli bonvenigis prezentante la kristnaskan kanton «Paca nokto» en du diversaj tradukoj, unu de la germano J. H. Vink kaj la alia de la anglo S. Brook. Ni kantis ambaŭ, kaj ni samopiniis, ke la germana estis la plej bona.

Elna Matland faris tre interesan prelegon pri la esperanta literaturo. Ŝi menciis la diversajn specojn de libroj: lernolibro, vortaroj, poezio kaj romanoj k.t.p. Ŝi montris diversajn librojn, interalie la plenan ilustritan vortaron, kiu estas tre impona verko. Fine ŝi legis el diversaj verkoj ekz. «Kalevala», «Viktoria» kaj el «Kun siaspeca spico» de R. Schwartz, libroj kun tre malsimila enhavo. Libro elotita estis gajnita de Johan Matland.

La prez. legis cirkuleron de NEL. La librokomiŝiulo Arthur Bjerke ven-

dis librojn kaj disdonis propagandan materialon.

Post la himno kaj manĝado Elna Matland gvidis la lingvan duonhoron. La hejmtaskoj estis ĉi-foje iom nekutimaj, kaj montriĝis ke la geanoj tro malmulte prilaboris ilin hejme. Tio kaŭzis viglan diskuton kiel fari la lingvaj duonhorojn pli bonaj kaj efikaj. Ĉeestis 14 geanoj.

Jarkunveno en Sauda Esperantoklubb

20/1—75.

La kunveno okazis en la hejmo de sanino Karen Berge. La prezidanto Norman Birkeli bonvenigis, kaj la sekretario Olav Andersen legis la jarraporton kiu aprobiĝis. La kasistino Olga Overskeid legis la kasan raporton, kiu ankaŭ estis unuvoĉe aprobita. Poste ni, laŭ propono de Elna Matland, decidis doni kr. 100 al la kontora fondaĵo.

Elektado de estraro donis la rezulton, ke ĉiuj membroj de la estraro reelektiĝis: prez.: Norman Birkeli; vicprez.: Arthur Bjerke; estrarano: John Malmquist; supleantoj: Aagot Bjerke, Eldrid Andersen; kasino: Olga Overskeid.

S-ino Anna Molla, kiu estis membro de nia klubo en la unua tempo kiam ĝi fondiĝis, legis malnovajn prologojn kaj eltrojn de la unua klubo gazeto. Rememoroj tre amuzaj kaj rememorindaj!

Post tre agrabla manĝopaŭzo Johan Matland gvidis la lingvan duonhoron. Li precipe klarigis, per kredo kaj tabulo, la uzon de la sufiksoj ig kaj iĝ.

Elna Matland legis salutkarton de la direktoro de la japana organizo Gomoto. La unua libro veninta de la

internacia libroklubo ellotiĝis, kaj ĝi estis gajnita de Olga Overskeid.

Arthur Bjerke legis leteron de nederlanda samideano kiu lastjare travivis multajn malfacilaĵojn. Ĉeestis la kunvenon 15 gesamideanoj.

Olav Andersen.

LA URSO, Sarpsborg

regule kunvenas ĉiun duan merkredon. En ĉiu kunveno estas unuhora instruado. Poste ni kolektas monon por la klubo kaso en diversaj amuzaj manieroj. En du kunvenoj J. Hammond Rosbach montris lumbildojn el sia aŭtomobila vojaĝo lastsomere al la nordaj partoj de nia lando. Stig-Otto Forsberg, stirilisto, kiu vojaĝas sur malproksimaj maroj, kaj membro de la Urso, en unu kunveno montris bildojn el Sri Lanka kaj rakontis pri tiu insulo, en alia kunveno pri la orienta parto de Usono kaj pri la vivo sur la ŝipo.

MARA VENTO, Haugesund

kunvenis 21/11-74. Post bonvenigaj vortoj la prez. informis pri la landa kunveno okazonta en Tromsø kaj estis disdonate cirkuleroj pri la planita vojaĝo al la kongresurbo.

Programulo estis Harald Gaard kiu prezentis tre interesan kaj plaĉan programon kiun forte aplaudis la ĉeestantoj. Li kunigis nin per tre allogaj kolorlumbildoj al belegaj fjord-regionoj en okcidenta Norveglando, konigante per vivaj priskriboj la diversajn lokojn kaj pejzaĝojn. La rigardanton speciale ravis bildoj pri la majesta Sognefjordo. Blue/verdaj idilioj, sorĉaj rokelpendaĵoj, vojoj zigzage serpentumantaj tra valoj mal-

larĝaj, ŝaumantaj akvofaloj kaj aliaj belaĵoj konsistigis bildpanoramojn mirindaj —.

Estis decidite ke la lasta kunveno de la jaro estu en festa kadro kiel en antaŭaj jaroj.

oto

Sukcesa renkonto sur la Haukelimonto

La aŭtuna aranĝo de la Okcidenta Distrikto refoje okazis sur la Haukelimonto, kaj ĉi-foje ĝi kunvenigis duoncenton da gesamidanoj. La aranĝon ĉeestis ankaŭ geesperantistoj el Oslo kaj Kristiansand S kaj ilin aparte bonvenigis la prezidanto dum la malfermo sabaton vespere.

Estis gaj-etosa kaj sukcesa vesperaranĝo. Ĉe la manĝotablo vigle sonis la Esperantaj kantoj — kaj dum la daŭro de la vespero alternis programeroj diversaj. — Norman Birkeli el Sauda ĝojigis la ĉeestantojn per bela violon-muziko kaj prezentis ankaŭ proprajn komponaĵojn. — Randolph Grotmål el Oslo plurfoje dum la vespero kontribuis per Esperantaj kantoj diverslandaj kun gitara akompano rikoltante multan aplaŭdon. — Johan Røkke el Bergen bone aktoris prezentante amuzajn dialogojn — kaj Georg Olsen el Haugesund ankaŭ kontribuis per Esperanta kantado. —

Inter la diversaj programeroj estis dancado, kaj ĝis post la noktomezo gajaj tonoj plenigis la festejon. Estis jam tre malfrue kiam oni iris dormi.

La posta tago estis dimanĉo kaj ekskursita tago. Favoris nin suna vetero. Matenmanĝinte kaj kantinte oni ekmarŝis por travivi la aŭtunan belecon de la montopejzaĝo. Abundis la aŭtunkoloroj, kaj tre ĝuplene estis okulkapti la vastan kolorspektron.

Posttagmeze estis tempo de disiĝo, kaj elkoraj «ĝis revido»j finis la agrablan kaj inspiran renkonton surmontan.

oto

Korespondu!

Mi tre volus korespondi. Maria Kovács (48-jara edzino), H-6800 Hódmezővársárkech, ul. Boróka 1, Hungarujo.

NORSK ESPERANTO-FORBUND (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100 30
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo:

Boks 942, Oslo. Postgiro 100 32

ESPERANTOFORLAGET A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100 31
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 1 33 29

La redakcio:

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c,
6500 Kristiansund N. Telefon: 77 6 20

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1

Trykt i HAAVES BOKTRYKKERI, Brumunddal